

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,

Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 47

Melburno (Melbourne), Australio.

10 majo 1924

ADIAU'O AL LA VIVO.

Je l'tablo de l'vivo, kun mia mizero,
unu tagon sidinte, mi svenas . . .
mi mortigas . . . Ĉe l'tombo, al kiu
mi venas,
ne eĉ unu min ploros sur tero.

Mi vin, kampoj amataj kaj verdaj,
salutas!

kaj vin, gaja arbara ekzilo!
Ho! naturo mirinda, ĉiela kovrilo,
adiaŭon al vi mi balbutas!

Tamen miajn amikojn, la senkompa-
tulojn,
rekompencu per ŝuo multjara!
Kaj al ĉiuj, mortintaj kun kapo
blankhara,
pia mano elfermu l'okulojn!

El la Franca de Gilbert (1751—
1780), Esperantigis D-ro G. Philip-
pet.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 30a aprilo ni ricevis la
jenajn sumojn: A. Feldmayr, 4/6,
aprilo '25; E. Chisholm, 4/6, marto
'25; J. B. Henry, 4/6, majo '25; A.
Saar, 6/-, junio '25; D. Hitchcock,
4/6, majo '25; J. G. Robert, 4/6, mar-
to '25; D. Fowler, 4/6, marto '25;
C. J. Martin, 1/-; "Nigra Cigno"
Grupo, 13/6; kontantaj, 6/4; J.
Orme, 4/6, marto '25; J. Marsich,
4/6, marto '25.

THE COMMERCIAL WORLD AND ESPERANTO.

From the excellent and practical
periodical issued by Mr. Robert
Kreuz in Cologne, "Internacia
Komerco," it is evident that the
business world is awake to the value
of the international language. Ad-
vertisements of manufacturers and
of commercial agents in various
countries are a feature, scarcely less
than the very readable articles on
such themes as the railway systems
of Africa, the agricultural and in-
dustrial fair of Riga, with remark-
ably good illustrations, and trade
advices from nearly every continent.

Two items of Esperantist inter-
est are noticed. The third Interna-
tional Aviation Exhibition at Prague
is favourably disposed to Esperanto,
—another to be added to an already
long list of such undertakings.

The Frankfurt Fair, which has for
some years used Esperanto in its
advertising and other public an-
nouncements, has issued a handbook
of commercial wares of all imagin-
able kinds, together with a directory
of business houses and their pro-
ducts, to be re-issued every half-
year. This is the largest publication
of its kind which has yet appeared
in Esperanto, and is only another
proof that "Esperanto pays."

THE KING'S SPEECH IN ESPERANTO.

"The speech was also broadcast in Esperanto for the benefit of continental listeners," said the daily paper report of the opening of the Empire Exhibition in London by His Majesty the King.

The very brevity of the note and the lack of accompanying comment shew that Esperanto is becoming more and more accepted as an everyday affair. Not so many years ago the incident would have excited much attention, and grave discussion would have centred around the question "if Esperanto will ever come into general use."

Two outstanding features of this century have fixed Esperanto in a permanent place in the public mind. The first was, of course, the Great War, which taught so many people the bitter need of understanding one another—even if only for the purpose of more effectively exterminating one another, and the second is the rapid development of radio-telephony by means of which whole Continents can listen to one speaker—can listen and only in a small degree understand, unless some means of address is used that is at once easy and clear.

Easy and Clear. Therein lies the difficulty with English as a spoken language between peoples not born to it. Whatever the claims of our noble national tongue to be a world language, the subtlety of its complicated vowel system and the loose limp enunciation of its consonants form a barrier that disheartens many and many a foreign learner who has been attracted by the real simplicity of its grammar and the merely apparent simplicity of its vocabulary.

As Professor Guerard points out in his penetrating and thoughtful work on international language, a person who has learned, say, Spanish or German, from books or even

from a moderately good teacher, would on first attending a lecture in either of those languages be able to distinguish many words by their sound or even occasionally whole phrases. With French the result would not be nearly so good, but still there would be some understanding. But English under such circumstances would sound like mere gibberish.

And so one is safe in saying that of non-English-speaking persons who heard the King's speech, those who heard the Esperanto version were being not at all distracted by difficulties of understanding) given the clearest conception of the aims and sentiment and attitude of the varied peoples who make up the great English Commonwealth of Nations.

ESPERANTO IN THE GERMAN REPUBLIC.

That part of the German Republic known as Prussia—and every one knows that it is by far the largest and most powerful state in the republic—has now followed the lead of the smaller states—Brunswick, Saxony, Hesse and others—in recognising Esperanto as a valuable part of popular education.

As a result of an inquiry instituted by the Prussian Minister of the Sciences, Arts and Public Instruction, it was found that a large number of teachers were able and willing to teach Esperanto. Whatever doubts the department may have had on the point appear to have been dispelled.

By a decree of the 10th March last the Minister orders the teaching of Esperanto as a subject additional to the ordinary curriculum in every way possible. Suitable classrooms are to be provided by local school authorities, and the decree is especially to receive the attention of the higher-school teachers.

*There is a Subscriber whose
Subscription is Overdue.....*

Is it You ?

Parents' committees are to be informed of the decision, and the essence and significance of Esperanto are to be explained to them. It must be made clear to the parents that the study of Esperanto in no way hinders, but in fact very actively helps, the study of other languages.

In those cases in which a state teacher is not available for teaching Esperanto, the students are to be permitted to attend at some other school until arrangements are made to provide a state teacher.

This action of the Minister of a powerful state, and one noted for the completeness and thoroughness of its educational system—even our Australian educationalists are not above learning from Germany—will have far-reaching effects. Not only is the teaching of the international language to the rising generation made possible, but the older teachers, those who will in a few years be at the head of the country's educational system, are to take an active part in its dissemination and will be led to discuss the language itself and methods of teaching with their colleagues in other countries—nor, apart from Esperanto education is becoming more and more international.

And lastly the parents, those who after all rule the country and decide its course, are to be made familiar with one of the greatest humanitarian movements of modern times.

KONCERTO PRO UEA.

Esperantan Feston aranĝis "Melbourne Esperanto Club" la 9-an de Aprilo en sia kunveno ĉe "Australian Church Hall," 19 Russell St.

La programo estis riĉa kaj tute esperanta. Unue himno "La Espero"; poste sekvis tri teatraĵoj, kies ĉiuj roloj estis luditaj de la anoj de la societo: "La komercisto Venecia" (I sceno el la II akto) ludita de tri armaj samideaninoj; Sonĝo de

Someromeza Nokto" (I sceno el la II akto), prezentita de ses sinjoroj, el kiuj precipe S:ro Pyke interpretis la rolon de Niĉjo Bottom kvazaŭ vera kaj sperta aktoro; la lasta sed plej bona estis l-akta spektaklo "La Triangulo," agrable prezentita de ĉiuj Elsie Godfrey kaj Violet Schmetzer, kaj s.-roj G. Hussey kaj R. Rawson.

Inter la teatraĵoj oni aŭdis kantojn de s:roj Davidson, McKenzie kaj Spears, kaj harpsolojn de s:ro Hussey.

La loka delegite de U.E.A., s:ro C. W. Ballard faris klarigantan priparolon pri Universala Esperanto-Asocio kaj pri ties signifo kaj valoro por plivastigo de Esperanto.

Kvar funtoj sterlingaj estis kolektita kaj forsendita al UEA.

RADIO-GAZETO EN ESPERANTO.

La peresperanta-poresperanta organizo RADIO-SERVO, Locarno (Svislando), fondita de grupo de svisaj, italaj kaj alilandaj samideanoj kaj esperanto-amikaj radio-fakuloj, nun publikigas sian anoncitan organon "Radio-Servo," kiu havas la specialan celon, propagandi la nuran uzon de Esperanto kiel internacia radio-lingvo kaj kontraŭbatali la malamikojn de Esperanto.

La Internacia Radio-Revuo "Radio-Servo" publikiĝas ĉiumonate en tutgranda ĉiutag-gazeta formato, ilustrita, ok-paĝa en du partoj:

(I) ĉef-parto kvar-paĝa nur-esperantlingva;

(II) aldon-parto kvar-paĝa diverslingva, por tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenas Esperanton, por esperantistigi ilin kaj por montri la taŭgecon kaj la senkonkuran monopolon, kiun posedas Esperanto kiel internacia radio-lingvo.

Jarabono kostas 1,25 usonajn dolarojn ĉe "Radio-Servo," Locarno (Svislando).

HALL'S BOOK STORE

'Phone : Windsor 6081.

Books and Music bought at your home.

Specialist in Secondhand School and College Books.

Secondhand Music.

264 CHAPEL STREET,
PRAHRAN

(Opposite Town Hall).

Libraries Valued.

AL NAJTINGALO.

Kvazaŭ pura la tintado
de pokalo el kristal',
sonas tra la paca nokto
via voĉo, najtingal'.

Kiel bela la de l' tonoj
kolorbrila mozaik';
vian kanton ne egalas
plej belega la muzik'.

De amanto la vaganta
en kampara la izol',
por vundita koro estas
via dolĉa voĉ' konsol'.

Via kanto estas himno
al ĉielo kaj al ter',
himno al la nokta paco,
kaj plenplena de esper'.

Via voĉo estas kvazaŭ
la siblado de hoboĵ';—
vin aŭskulti, najtingalo,
kia ĝuo, kia ĝoj'!

Jan van Schoor (Antverpeno).

RECENZO.

LA REGO JUDEA, de K.R. Dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj. El la rusa lingvo tradukis V. Devjatn-in. Dua eldono, de Paŭlo Medem, Smelio g. 12, Kaunas, Litovujo. Prezo, broŝ. 2.25 sv. fr., bindita 2.75 sv. fr.

Grandtalenta rusa poeto, (bedaŭrinde nun mortinta), kies socia rango, laŭ diro, estis eĉ pli alta, ol siaj poeziaj kapabloj, verkis poezian dramon, sub titolo "La Reĝo Judea." Baldaŭ post ĝia apero la dramo estis tradukita en sep lingvojn—Esperanto inter ili. Ĉar granda kvanto de la unua eldono malaperis dum la milito, s-ro. Medem entreprenis reeldonon. La enhavo estas konata

al ĉiu, leginta la Novan Testamenton. Sed rimarkinde estas, kiel delikate la aŭtoro priskribas la surteran vivon de Jesuo, neniel profanante la sanktecon de la temo. La tradukon faris la genia esperanta poeto Devjatnin, kaj ĝi estas senripoĉa. Tiuj, kiuj kapablas juĝi diras, ke ĝi estas mirinde konforma al la originalo. Ke prof. A. Dombrovski, magistro de teologio kaj akademiano trarigardis la esperantan tekston, tio estas garantio, ke la verko ne enhavas historiajn aŭ teologiajn erarojn. La libro estas tre bele presita, kaj la eleganteco de la preslitoj kaj la modela kompostado donas ĝojon al la vera amanto de bela libro. Kiel konvenas, preseraĵoj preskaŭ tute forestas. La libro estas brila juvelo, kaj ĉu pro la temo, ĉu pro la lerteco de ĝia prezentado, ĉu pro la flua stilo, aŭ ĉu pro la inspiro, kiun ĝi donas al la poeziemuloj, oni volus, ke ĝi ricevu vastan akcepton intern. (C.W.B.).

LITOVA ALMANAKO, el litova literaturo, penso kaj vivo, eldono de Litova Esperanto-Asocio, Kaunas, D. Vilniaus g. 34.

Jen imitinda ekzemplo por preskaŭ ĉiu nacio. Plena montro, de la literaturo, penso kaj vivo de popolo neeviteble donos plezuron kaj informon al legantoj el aliaj nacioj. La "Litova Almanako," libro de 284 paĝoj, skizas litovan arton kaj literaturon kaj donas biografion de Esperanta eminentulo, profesoro prelato A. Dombrovski; kaj du artikoloj de lia plumo havas lokon en la libro. La poemoj, la historietoj, kaj la artikoloj, provizas legmaterialon, el kiu la elstarantaj trajtoj estas amo por kaj fiereco pri Litovujo. Unu grandampleksa libro, simila al la nune preparolita, faras pli por Esperanta literaturo, ol dek du negrandaj broŝuroj el nur kelkaj paĝoj. (C.W.B.).

THE - CHOCOLATE - BOWL

18 Centreway

Collins Street, Melbourne

'Phone 2210

Best quality Chocolates, Nougats, Fudges, Marshmallows, Candies,
4, 5 and 6 oz., 1/-.

Fancy Boxes, 10/- upwards.

Aĉetu de Samideano!

TEACHING BY POST.

Our samideanino, Miss Lily W. Saw, of 22 Madden Street, Albert Park, Melbourne, is willing to teach Esperanto by post—a generous offer that should be welcome to students in the backblocks. (But when you write to Miss Saw, enclose a stamped addressed envelope each time).

The "Railway Union Gazette" of the Victorian Railways, which circulates also in other states, recently reprinted from "La Suda Kruc" Mr. H. Byatt's sketch of Esperanto and its help to the foreign immigrant into Australia. The editor also promised to arrange a study group in Melbourne for readers who might desire it.

KELKAJ C'APITROJ EL "QUATRE VINGT-TREIZE"

("Naŭdek-Tri").

De Victor Hugo.

Boisberthelot ne havis tempon respondi al La Vieuville. La Vieuville aŭdis sian parolon subite rompatan de malespera ekkrio, kaj samtempe bruoj audiĝis neniel simila al ordinarnaj bruoj. Tiu krio kaj tiuj bruoj venis el interno de la ŝipo.

La kapitano kaj la leŭtenanto alkuris al interferdeko, sed ili ne povis eniri. Ĉiuj kanonistoj resupreniris freneze.

Teruraĵo estis okazinta.

IV

TORMENTUM BELLI

Kanono el la baterio, pafilego de dudek-kvar centimetroj, estis sin liberiginta.

Tiu estas eble la plej timinda mara akcidento. Nenio pli terura povas trafi militŝipon en plena marveturo.

Kanono rompinta sian ligilon fariĝas subite supernatura besto. Ĝi estas maŝino kiu aliformigas sin en monstron. Tiu maso kuras per siaj radoj, havas movojn de bilarda globo, pendas pro balanciĝo, profundigaĵas pro tangado, iras, venas, haltas, ŝajnas mediti, reprenas sian ruladon, kvazaŭ sago trakuras la ŝipon de unu al alia pinto, turniĝas, apartiĝas, ŝteliĝas, ekstaras, ektuŝas, rompas, mortigas, detruas. Ĝi estas ŝafo laŭ sia bontrovo frapanta muron. Aldonu ankoraŭ: la ŝafo estas fera, muro ligna. Ĝi estas la liberiĝo de la materio; oni dirus ke tiu eterna sklavo sin venĝas; kvazaŭ la malboneco koviĝanta en tio, kion ni nomas senanimaj objektoj, subite eliĝas kaj eksplodas; kvazaŭ ĝi senpacienciĝis kaj entreprenas nun strangan malk-laran revenĝon; nenio pli malindulgema, ol kolero de senanimaĵo. Tiu furioza bloko havas saltojn de pantero, pezecon de elefanto, rapidecon de muso, obstinecon de hakilo, surprizon de marondo, subitecon de fulmo, surdecon de tombo. Ĝi pezas dek mil kilogramojn kaj resaltas kiel infana pilko. Ĝi turniĝas rapide kaj subite haltas. Kaj kion fari? Kiel ĉesigi tion? Stormo ĉesas, ciklono pasas, vento haltas, rompitan maston oni anstataŭas, akvan fluon oni ŝtopas, brulado estingiĝas; sed kion fari kontraŭ tiu grandega bruto el bronzo? Kiel agi kontraŭ ĝi? Vi povas logi dogon, mirigi bovan, sorĉi boacon, timigi tigron, kortuŝi leonon; neniu alpaŝo al tiu ĉi monstro, kanono kolera. Vi ne povas mortigi ĝin, jam senviva ĝi estas. Kaj samtempe ĝi vivas. Ĝi vivas per terura vivo venanta el la senfino. Ĝi havas sub si sian plankon, kiu balancas ĝin. Tiun skuas la ŝipo, kiu estas skuata de la maro kaj tiu ĉi de la vento. Tiu eksternisto estas ludilo. La ŝipo, la ondo, la blovoj, ĉio ĉi regas ĝin; tial ĝia timiga vivo. Kiel agi kontraŭ tiu kunlingo? Kiel malakordigi tiun monstran meĥanisman de subakviĝo?

PHILLIP ISLAND

"Redcliffs," Newhaven.

The Ideal Tourist Resort.

6 hrs. from Melb. by boat and rail.

Accommodation for 50 Guests.

—First Class Table.—

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

J. E. S. RICELOW "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND

Kiel antaŭvidi tiujn irojn kaj revenojn, tiujn reirojn, haltojn, kontraŭbatojn? Ĉiu el la kontraŭbordaj frapoj povas enfundiĝi la ŝipon. Kiel diveni tiujn timigajn komplikajn movojn? Oni batalas kontraŭ kuglego, kiu entuziasmiĝas, kiu havas mienon penseman, kaj kiu ĉiunmomente ŝanĝas sian direkton. Kiel haltigi tion, kion oni devas eviti? La terura kanono moviĝas, antaŭeniras, returnen venas, dekstren batas, malddekstren frapas, forkuras, pasas, kunfuzas la atenton, forbalaas la baron, pereigas homojn kiel muŝojn. Tuta teruro de la situacio kuŝas en la moveco de la planko. Kiel batali kontraŭ klinebenajo kapricema? La ŝipo portas, por tiel diri, en la ventro la enfermitan pulvon kiu celas eliĝi; io kvazaŭ tondro rulanta sur tertremo.

En unu momento la tuta ŝipanaro ekstaris. Kulpa estis la kanonestro, kiu forgesis streĉi la ŝraŭbingon de la ligoĉeno kaj malperfekte fiksas la kvar radojn de l' kanono: tio kaŭzis moviĝon de la plando kaj ĉasio, malkordigis ambaŭ plataĵojn kaj fine rompis la ĉenon. La kanonŝnuro estis rompita, tiamaniere, ke la kano ne plu estis fiksita al la afusto. La fiksa meĥanismo, kiu malhelpas la retroiron, ne estis ankoraŭ uzata en tiu epoko. Marbato ekfrapis la embrazonon, la malbone fiksita pafilego returneniris, rompis sian ĉenon kaj terure ekvagiis sur la interferdeko.

Por kompreni tian strangan glitadon, oni imagu akvoguton kuran sur vitroplato.

En la momento, kiam la ĉeno rompiĝis, la kanonistoj ŝtaris ĉe la baterio. Unuj grupe, aliaj dise, okupiĝis pri la marlaboroj de maristoj antaŭvidantaj batalan okazon. La kanono, ekpuŝita de l' tangado, fendis truon en tiu grupo kaj de l'unua ekbata dispremis kvar homojn, poste prenita kaj sendita de la balanciĝo, ŝi duonigis alian malfeliĉulon kaj alĵetis kontraŭ babordan parion pecon de la baterio malmuntita. El tie venis la ĵus aŭdita angorkrio. Ĉiuj homoj sin alpremis sur la ŝtuparo. La baterio senhomiĝis laŭ rapideco de okulfermo.

La grandega maŝino estis forlasata. Ĝi estis tute libera. Ĝi estis i-

mastro kaj mastro de la ŝipo. Ĝi povis agi laŭvole. Tuta ŝipanaro kutiminta al rido dum batalo tremis. Priskribi la teruron estas neeble.

Kapitano Boisberthelot kaj leŭtenanto La Vieuville, du kuraĝuloj tamen, haltis ĉe l' supro de la ŝtuparo, kaj mutaj, palaj, hezitantaj, rigardis la interferdekon. Iu kubutdisigis ilin kaj malsupreniris.

Tiu estis ilia pasaĝero, la civilulo, la viro, pri kiu ili ĵus parolis antaŭ momento.

Atinginte la malsupron de l' ŝtuparo li haltis.—Daŭrigota.

El franca lingvo tradukis Marian Sola (El "Kataluna Esperantisto.")

ANONCOJ.

Kolektantoj.

ĉu vi volas aliĝi al Internacia-Esperantista Interŝanĝoklubo "Amikeco?"

Membroj en pli ol 40 landoj. Unua pure esperantista. por interŝanĝi poŝtmarkojn, pk. il papermonon ktp. kaj por korespondo kun la tuta mondo. Postulu prospekton kontraŭ respondkupono de F. Jacobi, Coblenz, Bahnhofstr. 29, Germanujo.

Sinjoro Seiici Jamada, Izumi, Jamagata, Gifu (Japanujo), deziras interŝanĝi PM kaj PK.

Inter Amikinoj.—Nu, vi trovas, ke ŝi estas bela? Tamen ŝiaj okuloj esprimas nenion!

— Jes, vere, sed ŝia buŝo . . .

— Bedaŭrinde, ĝi faras la malon.

Dum Milita Ekzercado. — Kapitano, diras—leŭtenanto,—jam ne estas kartoĉoj.

— Tute ne?

— Ne eĉ unu restas!

— Nu, ĉesigu la pafadon!

Finita Amindumo. — Du sinjorinoj interparolas:

— Kaj ĉu la juna Petro ĉiam amindumas vian filinon?

— Ne, finite!

— Li foriris?

Riĉa Bankiero Diris:— kiam mi komencis negocadi, mi posedis nenion . . .

— Jes, sed tiuj, kun kiuj vi komencis, estis riĉaj, tiam!

En La Pentraĵa Ekspozicio:—Kion vi pensas pri mia portreto?

— Malkaŝe, ĝi ne estas bela . . .

— Vere?

— Sed tre simila . . .

LA GAZETOJ.

La gazetoj ne tute forgesis nin. La "Sun" (Sidnejo) reportas pri disradiado de Esperanta kanto el Bournemouth (Anglujo) sub titolo "Mia Kamarado."

La "Labour Daily" (laborista taggazeto, Sidnejo), represas parton el la trafa artikolo de profesoro Charles Sarolea el la nova revuo "International Language" sub la titolo "World Peace and a Common Language" (Monda Paco kaj Komuna Lingvo).

La "Sun News-Pictorial" (Melburno) raportas la disradiadon de la parolo de la Reĝo ĉe la malfermo de la Imperia Ekspozicio en Londono, kaj asertas, ke "tio ĉi tiom kuraĝigis la ĉitieajn Esperantistojn, ke ili organizas tutaŭstralian kongreson en Melburno dum la venonta jaro"! Ho, fidindaj gazetoj!

La Melburnaj gazetoj ankaŭ raportis la parolojn de sinjoroj Robert Jones kaj J. G. Pyke, pri kiuj ni raportas aliloks.

HERE AND THERE.

The new headmaster of Altrincham Grammar School, England, the Rev: W. G. H. Thomas, B.A., convinced during his missionary experience abroad of the value of such a language, has introduced Esperanto into the school curriculum.

"Pitman's Journal" in a recent issue has an excellent leading article on "The Future of Esperanto."

Esperanto in the service of classical Greek is the latest. A dramatic festival is arranged for Syracuse, Sicily, for the presentation of Greek drama, and the prospectus of the festival has been issued in Esperanto.

Other schools where Esperanto has recently been introduced are the Friends' School, Penketh, near Warrington, the Knole Hall Girls' School, Eastbourne, both in England, and the Paris Higher Commercial School for Women.

Yet another instance of the use of Esperanto in the sphere of national propaganda. An Esperanto translation of the work of Senator Andre Honorat, a former Minister of Public Instruction in France, "The Safety of France" is announced under the title "La Sekureco de Francujo," with a special preface by the author.

Goethe's "Iphigenia im Tauris" is to be presented in Esperanto again at the 16th International Congress in Vienna, by a company of distinguished performers. Speaking of its first presentation at Dresden, "La Revuo" said that it "did more to proclaim the harmonious quality of our language than a thousand speeches of the most convincing orators." The Esperanto version is by Dr. Zamenhof.

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name among the Esperantists of the world.
Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen,
224 Barker's Road, Glenferrie, Melbourne.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders. . .

See testimonials.

For Children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Australian Agent: A. R. Cohen,
224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A.
(Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vicprezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejoj: Hardware Chambers, 350 Little Collins-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro E. Chalice, poŝte adreso: Good-str., Murrumbeena. Kunvenejoj: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejoj kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo.—Prezidanto, S-ro Alfred Gregory. Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejoj: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejoj: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro Blundy. Sekretariino, F-ino L. M. Irwin. Kunvenejoj kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl-str.; Murrumbeena, (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Malvern Girls' Club"-Grupo. Prezidantino: fraŭlino N. L. Byatt. Sekretariino: fraŭlino A. Midsley. Kunvenejoj kaj poŝte adreso: 117 Glenferrie-Road, Malvern, marde je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str.; Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo, "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejoj kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta.—Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejoj: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunvenejoj, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejoj: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.